ESPERANTO SUB

LA SUDA KRUCO



Numero 18 [1995/6] — Novembro-Decembro 1995

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304, Aŭstralio. ☎ kaj faksoj: 096 46 1389. (Faksoj eblas nur post tujantaŭa averto per telefono.) Elektronika poŝto:
<don@enkidu.dialix.oz.au>
Correspondence Courses (Australia): John Moore, 7 Pelican St, Emu Park Qld 4702, Aŭstralio.
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

Se vi deziras legi pri io, verku artikolon!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: "Ni vere bezonas artikolon pri...?" Do sendu tiun amatan eseon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon sur komputila disko (Macintosh aŭ MS-DOS—nur 3.5 cola) aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas redakti kaj korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo, kaj konformigi ĝin al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo de artikolo ne indikas ke ĝi reprezentas la vidpunkton de la Aŭstralia aŭ Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

ADRESOJ

La Aŭstralia Esperanto-Asocio: P.O. Box 313, Sunnybank Qld 4109
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2014
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035
Prezidanto: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669
Sekretario: Brad McDonald, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj faksoj: 09-579 4767
Kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Por abon- kaj membro- kotizoj vidu pĝ. 31.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Vizitanto (Donald Broadribb)..... 3
Deziras korespondi..... 6
Ni gratulas..... 10
3a Internacia literatura konkurso por junaj komputiloj (Odlo Bokserp)..... 13
Universala Kongreso 1997 en Adelajdo (Dianne Lukes)..... 14
Kongresaventuroj (Kep Enderby)..... 15
Skribas la legantoj (Terry Manley)..... 19
Esperanto en Aŭstraliaj lernejoj..... 19
Masterton Esperanto-Klubo..... 20
Paul Desailly skribas..... 20
Lingva Angulo (Alan Towsey)..... 21
Ili mortigas Esperanton inside (Marcel Leereveld)..... 24
Komentoj (Donald Broadribb)..... 25
AEA-kontoj..... 29

Libroj:

Komputika Leksikono..... 7
Eposoj el Antikva Ugarito..... 8
La Kunularo de l'Ringo..... 11
Veneno Kara..... 12

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la januara numero: 22 decembro.

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Internet, ĉe:
http://www.dialix.com.au/peterb/esk/index.html

VIZITANTO

Rakonto de Donald Broadribb



iam mi aŭdis frapon sur la pordon, mi skribantis artikolon por *Scientific American*, prestiĝa gazeto por kiu mi ofte verkas. Iom ĝenis min la interrompo, sed mi iris al la pordo kaj malfermis ĝin. Tie staris viro nekonata.

"Doktoro Konsilanto," li diris, "ĉu mi rajtas? Mi deziras diskuti kun vi vian artikolon kiu aperis en la *Sydney Morning Herald* hieraŭ."

Mi hezitis. La nova artikolo por la *Scientific American* profunde okupis min, kaj mi ne volis perdi mian pensfadenon. Ial mi ekpensis ke mi rekonas la vizitanton. Sed mi bone memoras vizaĝojn, kaj certe mi ne vidis tiun vizaĝon antaŭ nun. "Mi vere estas ne tre libera nunmomente," mi diris. Tamen la vizitanto ŝovis sin preter min kaj enpaŝis.

Kutime mi proponas tason da kafo al miaj vizitantoj, sed mi ne volis kuraĝigi lin longigi sian viziton, do mi nur sidigis min sur seĝon kaj pergeste petis lin sidiĝi ankaŭ.

"Laŭ la ĵurnalo vi partoprenas en la SETI-projekto[1] serĉi signalojn de eksterteruloj," la vizitanto diris.

"Kaj sendube vi volas montri al mi fotojn pri iu fluganta telero kaj informi min ke pasintasemajne trikapaj Marsanoj kidnapis vin," mi diris malestime. "Min jam naŭzas tiom da kredemuloj sensciencaj. La telefono apenaŭ ĉesis sonoradi inter la publikiĝo de tiu artikolo en la *Sydney Morning Herald* kaj nun. La ĵurnalo tute misraportis kion mi diris; laŭ mia opinio eksterteruloj ne ekzistas. Do, bonvolu foriri kaj ne plu ĝeni min." Mi aŭtomate respondis, tre malĝentile pro la amaso da telefonaĵoj ĝenintaj min, sed samtempe mi ekkonsciis: lian voĉon mi rekonas, kvankam ne lian aspekton. Vere tro klare mi rekonas tiun voĉon.

"Vi miskomprenas min," la vizitanto diris. "Ankaŭ mi ne kredas je ilia ekzisto. Tamen mi supozis ke vi kredas je ili, kaj mi volis seniluziigi vin pri tio." Li ridetis, sed li parolis iom pli severe ol necesis. "Kaj mi ne komprenas kial, se vi ne kredas je eksterteruloj, vi partoprenas en la SETI-projekto."

Eble vi, kiu legas ĉi tion, memoras ke frue en ĉi tiu jaro oni vaste diskonigis pri la projekto. Per radioteleskopoj oni esperas aŭdi signalojn senditajn el malproksimaj partoj de la kosmo. Multaj eminentaj astronomiistoj venis al Aŭstralio tiucele. Kaj multmilionojn da dolaroj oni elspezas por tiu projekto.

"Nu, kelkaj amikoj interesiĝas," mi diris. "Kaj ili petis min raporti."

"Konfidencan raporton, sendube," la vizitanto diris. Mi sulkigis la frunton kaj la vizitanto tuj rimarkis tion. "Trankviliĝu, mi mencios ĝin

[1] SETI = Serĉo je Ekster-Tera Intelekto.

tion. "Trankviliĝu, mi mencios ĝin al neniu," li diris. "Tamen, mi bone scias ke vi estas la ĉefkonsilanto de Generalo X, kvankam verŝajne neniu alia ĉi tie scias tion. Kial tiu honorinda Generalo sendis vin interesiĝi pri SETI?"

'Ne necesas ironii,' mi pensis. 'Ne nur vi rekonas min, ankaŭ mi rekonas vin. En ĉi batalo vi ne venkos, mi promesas al vi tion.' Voĉe mi diris: "Nur pro hazardaĵo. Iuj Rusaj sciencistoj transdonis al ni arkivon en kiu estis raportoj pri signaloj aŭditaj dum ilia spacpropramo en la Sovetia epoko, sur frekvenco 1420. Ili kredis aŭdi strangajn signalojn, kaj volis ke ni konfirmu aŭ malkonfirmu ilian trovon."

La vizitanto frotis sian mentonon. "Mi suspektis ke io tia eble okazis. Kaj ĉu vi do povis konfirmi ilian trovon?"

"Ne," mi diris. "Ni zorge esploris la frekvencojn kiujn ili aŭskultis. Ilia sperto nur temis pri hazardaj kosmoradiaj bruoj.—Pardonu, mi malĝentilas. Ĉu al vi plaĉus taso da kafo?"

Mi ja devis ŝanĝi mian opinion ke ĉi tiu vizito ĝenas. Male, ĝi povos esti tre grava.

"Kafon? Mi preferas teon, se vi havas", la vizitanto diris. "Tuj kiam mi ekgustumis teon mi ekamis ĝin."

Mi iris al la apuda kuirejeto, kaj la vizitanto sekvis min. Evidente tre interesis lin rigardi la preparadon de la teo. Mi prenis tefolierojn el kesteto—"Mi ne ŝatas uzi la saketojn," mi diris. Li aspektis tre konfuzita, kio ne min mirigis, sed mi ne eksplikis al li.—Ŝutinte la folierojn en poton mi enverŝis bolantan akvon. "Biskvitojn mi ne havas," mi diris pardonpeteme. "Mi estas diabeta, kaj ne havas dolĉaĵojn en la domo."

"Ĉu?" la vizitanto diris. "Ne gravas. "Mi preferas teon."

Ĉu eble li ankoraŭ ne renkontis biskvitojn kaj supozis ke ili estas ia alternativa trinkaĵo? Mi sciemis pri tio, sed decidis ke estas plej dezirinde ne demandi.

Ni residiĝis, ĉifoje en komfortaj brakseĝoj.

"Do ĉio bona, ĉu? Vi ne bezonas timi." La vizitanto videble estis malpli strecita nun. Eble tia estis la efiko de la teo. Tanino tiel efikas je nekutimiĝinto.

"Ni ne bezonas timi," mi konsentis. "Kvankam ni mem antaŭe kredis..." Mi hezitis. Ĉu mi menciu nian suspekton, kiu ne plu estis suspekto?

"Kredis kion?"

"Nu, en unu el la televidobildoj senditaj de la spacesplora ŝipeto Mariner 4, ĝuste antaŭ ol ĝi surgrundiĝis sur Marson—en unu el tiuj fotoj estis malklaraĵo kiun iu ekzamenanto kredis tegmento de subgrunda misillanĉejo. Absurda supozo, kompreneble. Tial ni ne menciis ĝin al la ĵurnaloj. Sed ni volis certiĝi ke ĝi ja estas absurda. Kelkaj el ni estas iom paranojaj —tro influiĝis de malnovaj rakontoj pri kaŝita Marsa civilizacio kiu pretiĝas ataki Teron. Plena absurdaĵo. Sed ni decidis ke en la sekva

esplorŝipeto estu sent-aparatoj kapablaj trovi subgrundajn instalaĵojn. Kaj ia rimedo uzebla se montriĝus ke Marsanoj ja intencas ataki."

Dum kelkaj sekundoj regis silento dum ni trinkis teon. Mi elverŝis duan tason por la vizitanto, ĉar tre rapide li plenglutis la unuan kiam mi diris tiun lastan frazon.

"Tiuj malnovaj rakontoj tamen estas stultaj," la vizitanto komentis, post iom da medito kaj plia glutego da teo. "Kiam oni verkis ilin, oni kredis ke ekzistas kanaloj plenaj de akvo sur Marso, kaj ke ĝi estas tre aĝa planedo kun civilizacio laŭsupoze jam multmil jarojn daŭrinta. La spacesplorado kiun vi jam faris certe komprenigis vin ke neniu kanalo, kun aŭ sen akvo, vere ekzistas sur Marso. Kaj rilate al Marsaj civilizacioj, mi scias ke via Orson Welles timigis la homaron per sia radiodramigo de la romano de H.G. Wells[1], sed tio estis nur absurda elpensaĵo. Nenio serioze konsiderinda."

"Nu, jes, vi parte pravas," mi diris. "Mi diris al vi ke mi konvinkitis ke eksterteraj vivantoj ne ekzistas, nek povas ekzisti. Sed ni, ankaŭ mi, opiniis ke estus dezirinde povi unufoje por ĉiam nuligi tian minacon se ĝi, hipoteze, ja ekzistus."

La vizitanto ektremetis, plu trinketadis sian teon, kaj pensis.

Necesas diri ke ankaŭ mi mem tremetis. Kiel mi konvinku ĉi tiun vizitanton ke mi seriozas?

La vizitanto nervoze ridetis.

"Eĉ Usonanoj kiuj elspezis miliardojn da dolaroj por la fiaska 'Stelmilitoj'-projekto ne povus fari tion", li diris, paŭzante dum sia rideto. "Kaŝita civilizacio sur Marso—se ĝi ekzistus, kaj mi certigas vin ke ĝi ne ekzistas—ja ne estus nuligebla de Teranoj."

"Vi eraras pri la 'Stelmilitoj'-projekto," mi respondis, "tiom fiaska ĝi ja ne estas. Ni pruvos tion hodiaŭ mem."

"Ĉu?" Li estis evidente surprizita, kaj levis siajn brovojn dum tre evidenta tremado.

"Jes. Ni pruvos ĝin post nur du horoj. Samtempe kun alia eksplodo tre malproksima. Vi povos mem sperti kiom efika ĝi estas. Sendube kiam vi spertos ĝin, vi konsentos kun mi ke ĝi nepre ne estas fiasko."

"Spertos?..." li paŭzis, hezitis, serĉis vortojn. "Jes, mi kredas kompreni. Sed...pro kio tia 'pruvo'? Eĉ Usonanoj bezonas iun motivon."

"Hipotezo," mi diris. "Hipotezo. Hipoteze—ni supozu por nia hipotezo ke ekzistas Marsanoj, kaj ke pravis la strategiistoj kiuj kredis trovi indikon pri subgrunda misillanĉejo sur Marso."

"Eksterordinara hipotezo," li diris.

"Aŭ eble ni prefere diru 'ekstertera hipotezo'," mi kvazaŭŝercis, sed nek mi nek la vizitanto ridetis nek ridis. "Nu, laŭ tiu nia hipotezo, ni konjektu ke tiuj Marsanoj atakas Teron. Ke estas aro da atakontaj spacoŝipoj jam ĉirkaŭ Tero."

"Malfacile eĉ hipoteze konjekti

[1] "Milito de la Mondoj", disaŭdigita en 1938 en Usono; poste en aliaj landoj.

tion," la vizitanto diris maltrankvile. "Kian hipotezan kialon vi havus por kredi tian situacion verŝajna?"

"Kialo eblas," mi respondis. "Ankoraŭ tason da teo? Mi kredis ke jes." Mi levis min, paŝis en la kuirejon, preparis plian poton da teo, kaj reportis ĝin. Intertempe, la vizitanto povis kontempladi la 'hipotezan' situacion. Li ankaŭ kontemplis kelkajn elektronikajn aparatojn sur breto apud interna muro de la ĉambro.

"Speciala radioaparato?" li diris. "Ĝi estas iom nekutima. Konektita al komputilo."

"Jes," mi diris. "Konektita ankaŭ al la radioteleskopa centro. Hipoteze mi aŭskultadas Generalon Mapu."

"Mapu?" la vizitanto diris. "Ĉu mi konas tiun nomon? Pri kio parolas tiu Generalo?"

"Hipoteze li estas la komandanto de la Marsaj invadontoj. Li parolas al aliaj spacoŝipoj."

"Mmm, mi komprenas." Li pensis. "Kaj, do, hipoteze, vi sukcesis deĉifri la Marsan lingvon?"

"Ankaŭ tion," mi diris. "Hipoteze, ne estis malfacile."

"Se vi diras."

Videble la malkvietiĝo de la vizitanto plifortiĝis, kvankam li volis kaŝi ĝin. Mi ekrigardis mian brakhorloĝon.

"Mi vere ne disponas pri pli da tempo," mi diris. "Bonvolu pardoni. Verŝajne vi scias nun kion vi bezonas scii."

"Verŝajne." Li levis sin, kaj rigardis mediteme la trafenestre videblan kamparan pejzaĝon. "Estus domaĝe, se hipotezaj Marsanoj volus detrui tiun belan vidaĵon."

"Nu, ili ne faros tion," mi diris. "Surprizatako detruos ilian atakŝiparon; kaj samtempe nukleaj bomboj nun orbitantaj ilian planedon ekeksplodos. Post precize du horoj. Domaĝe tiel detrui tutan mondon. Se eblus averti ilin, eble ili forvokus siajn spacoŝipojn kaj tiel savus sin."

Dum la vizitanto trakuris la pordon, mi vokis al li: "Kaj bonvolu transdoni miajn salutojn al S-ino Mapu, Generalo!"

Pacan dormadon, amikoj. ❑

Deziras Korespondi

Adreso de la Korespondservo de AEA:
Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428.
Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

// GUSEVA Nataŝa. Soleĉnogorskij reg. pos. VNIIPP 8-139, Rusio 141552. 16-jara. Moskva regiono.

// KUZNECOV Anatoly, 918-30 Moskva, Rusio 103575. 36-jara. Ĉefredaktoro de la loka radio-servo Zelenogrado.

// ARENHART Waldomiro, Av. Brasil No. 2330/30, 30-000 Bain, Camboriu-SC, Brazilo. 54-jara. Interesiĝas pri kutimoj kaj popoloj de Aŭstralio. Ŝatas muzikon, filmojn, aŭtomobilvojaĝojn, bultenojn kaj legaĵojn pri Aŭstralio. [Pli sur paĝo 23.]

KOMPUTIKA LEKSIKONO

Recenzas Donald Broadribb

Komputika Leksikono de Sergio Pokrovskij. Jekaterinburg (Rusio): Sezonoj, 1995. 365p., bindita.

Enhavo: Unuaranga
Preskvalito: Legebla
Bindo: Malbona
Papero: Malbona

Ĉi tiu verko estas elstara ekzemplo de zorge preparita, zorge preslegita leksikono. Sergio Pokrovskij estas membro de la Akademio de Esperanto, profesie li estas komputilisto.

Pokrovskij tre saĝe pritraktas sian temon. Liaj principoj: laŭeble eviti novajn radikojn; kaj kiam necesas uzi Anglalingvajn pruntaĵojn, kiom eble traduki la Anglalingvajn terminojn anstataŭ transliterumi ilin. (Plejparte terminoj komputilaj originis en la Angla lingvo.)

Ekzemploj de tiu saĝeco: en la literaturo Esperanta oni ofte trovas la monstran terminon "Vindozo", pseŭdoesperantigo de la Anglalingva vorto "Windows", nomo de multe uzata programo por IBM-kongruaj komputiloj. La Anglalingva programo ricevis sian nomon, ĉar la programo imitas sur la ekrano de la komputilo la aspekton de fenestroj. Pokrovskij tute prave forĵetis la abomenindan terminon "Vindozo" kaj uzas, anstataŭe, "fenestro-sistemo".

Anstataŭ adopti neologismon "karaktro", ofte proponatan, Pokrovskij proponas la familiaran terminon "signo", kiu en komputilaj laboroj signifas precize la sencon de la Anglalingva termino "character" kiam uzata de komputilistoj. Sed kiam speciala nova termino ja estas bezonata, li ne hezitas proponi ĝin. Ekzemple: *stiri* ("control" en la Angla lingvo), *reĝistro* ("register" angle —"peco de la interna memoro de komputilo aŭ adaptilo, kutime havanta la kapaciton de unu memorvorto, uzata por specialaj celoj").

Li ankaŭ proponas specialan uzon de kelkaj termineroj por fakaj celoj. Ekzemple, li distingas inter "uzanto" (kiu povas esti homo, procezo, aŭ programmodulo) kaj "uzulo" (uzanto kiu estas homo).

Ĉi tiu leksikono ankaŭ havas indekson de Anglalingvaj terminoj. Tre trafe Pokrovskij anstataŭ prezenti apartan liston aŭ indekson integrigas la Anglalingvajn vortojn en la vortordon de la leksikono mem. Ekzemple, inter la artikoloj *indiko* kaj *indukto* troviĝas unulinia alineeto tekstanta: "¶ induction: indukto, rikuro[1] ". Grava valoro de tiu maniero enlistigi la Anglalingvajn terminojn estas ke grandparte Anglalingvaj terminoj multe similas la Esperantajn, do Esperanta listigo troviĝas preskaŭ ĉiam en la tujsekvaj alineoj, kio multe ŝparas tempon kaj mishumoron ĉe la "uzulo".

Verko nepre imitenda. ❑

[1] Teknika termino uzata en programargumentado kaj -preparado.

EPOSOJ EL ANTIKVA UGARITO

Recenzas Ron Gates

Eposoj el Antikva Ugarito: Baal kaj Anat, Krt, Aqht. Tradukita el la Ugarita lingvo de Donald Broadribb. Beverley WA: Bookleaf Publishing, 1995. A-4-formata: iv+46p. $12 ĉe la Libroservo.

Mi konfesu ĉe la komenco ke, antaŭ ol mi ekvidis ĉi tiun volumeton, mi konis nek la substantivon "eposo" nek la antikvan urbon Ugarito.

La unua manko estis facile plenigebla. Kvankam "eposo" ne menciiĝas en la *Esperanto-English Dictionary* de Butler, ĝi ja troviĝas en *PIV*, kie ĝi estas difinita, post la vinjeto por beletro, kiel "la rakonta poezio". Krome, la substantivo *epos*, rekte el la Helena kaj kun la signifo "early epic poetry", aperas en tri Anglaj vortaroj kiujn mi konsultis (sed, strange, ne en la dua eldono de *Australian Concise Oxford*).

Pri Ugarito, male, mi sukcesis eltrovi preskaŭ nenion aldone al la informo prezentita de D-ro Broadribb mem en sia enkonduko al la tradukoj.

Dank' al tiu fonto mi scias ke Ugarito situis borde de Mediteraneo tuj sude de Turkio (tio estas, en nuntempa Sirio), kaj ke arkeologia fosado, ankoraŭ ne finita, jam malkovris en la sama loko restaĵojn de urbo ekzistinta je proksimume 7000 jaroj antaŭ Kristo. Kaj, kio pli rilatas al la eposoj, la esplorado, kiun oni komencis en 1929, aperigis grandan kvanton da surskribitaj argilaj tabuletoj datiĝintaj de ĉirkaŭ 1500 jaroj a.K., kiam la urbo ĝuantis sian lastan floradon antaŭ la detruo fare de la Filistoj.

La tridek literoj de la Ugarita alfabeto estis skribitaj kojnoforme. Laŭ D-ro Broadribb, la lingvo parencas al la klasika Hebrea. Interese, lerneja tabuleto trovita post la dua mondmilito montras la Ugaritajn literojn en ordo simila ne nur al tiu de la Hebrea alfabeto, sed ankaŭ al tiu de la alfabetoj uzataj en la lingvoj de Eŭropo moderna.

Evidente temas pri signifoplena eltrovo—aŭ, pli ĝuste, sinsekvo da eltrovoj. Kial, do, serĉante en mia koncede ne granda kolekto da enciklopedioj kaj aliaj fontlibroj, mi trovis neniun mencion de Ugarito? En nur unu artikolo, kiu pritraktis la kojnoforman sistemon de skribado, aperis nerekta aludo: post mencio de kelkaj lingvoj, la plimulto el kiuj uzis grandegan aron da signoj, la kontribuanto aldonis, "Alfabeta kojnoforma skribsistemo de nur 30 simboloj estis retrovita ĉirkaŭ 1929 el elfosaĵoj en norda Sirio."

Eble, se mi povus meti la manon sur mian ekzempleron de *What Happened in History*, verkita, se mi ne eraras, de Gordon Child, mi trovus tie-ene pli da informo. Mi klare memoras ke mi legis tiun libron antaŭ proksimume 45 jaroj; sed en kiu skatolo ĝi nun kuŝas, tio estas alia demando. (Tiun rememor-

on mi ŝuldas al la reago de tiama kolego, kiu, rigardinte super mia ŝultro dum mi legadis en la salono de registara pensiono en Kanbero, konsilis min esti pli singarda. La libron de Child, li asertis, oni oficiale karakterizas kiel kontraŭ la reganta filozofio kaj danĝere erar-an—unuvorte, subfosan.)

Inter la multnombra kolekto da elfositaj tabuletoj, plejparte administraciaj, ĉi tiuj estas la solaj literaturaj tekstoj pli-malpli bone deĉifreblaj. Kaj ili temas pri rilatoj inter iuj rolantoj, ĉefe dioj, en la religia mitologio de Ugarito.

En la unua kaj plej longa poezia rakonto, la dio Baal, alinome la Sinjoro, venkas Maron, kiu volis sklavigi lin; Anat, la fratino kaj edzino de la Sinjoro, kaprice faras militon, buĉante multege da homoj, ĝis la Sinjoro venigas ŝin kaj plendas ke mankas al li palaco; Anat petas de Dio domon por li, kaj post pluraj iroj kaj venoj la palaco estas konstruita; kaj, fine, la dio Morto pro venĝo mortigas la Sinjoron, Anat atakas Morton, kaj la Sinjoro reviviĝas.

En la dua eposo, reĝo Krt (oni prononcu aŭ Keret aŭ Kretu), perdinte pro morto sian familion, sieĝas urbon por devigi la tiean reĝon cedi sian plej aĝan filinon kiel edzinon; multaj geinfanoj naskiĝas; Krt poste malsaniĝas, kaj ŝajne pro tio okazas katastrofa senpluveco sur la tero, ĝis Dio sendas diinon resanigi lin; kaj Krt respondas kolere al unu el siaj filoj, kiu petis ke la reĝeco estu cedita al li.

La tria rakonto estas pli fragmenta ol la aliaj. Ĝi temas pri Aqht, la filo havigita de Dio al Danilu plenume de ĉi ties sopiro. La dia ĉarpentisto donacas al Danilu pafarkon, kiun li transdonas al Aqht. Avidante ĝin, Anat akiras la permeson de Dio forpreni ĝin. Kiam Aqht rifuzas, Anat aranĝas ke li estu mortigita. Sekvas sepjara senpluveco. La fratino de Aqht sin vestas kiel knabo por venĝi lin.

Jen skeleto de la rakontoj. Laŭ la enkonduko fare de la tradukinto, la tekstoj "estis diktitaj de profesiaj recitistoj al skribistoj de la biblioteko de la palaco de la reĝo de Ugarito". Alilingvaj aludoj indikas ke la poemoj ekzistis jam plurajn jarcentojn antaŭ sia surtabuletigo. Aparte interesaj estas naŭ eltiraĵoj el la Biblio, retradukitaj de D-ro Broadribb, kiuj aludas la rakonton pri Baal kaj Anat kaj plejparte mencias la samajn detruon kaj venĝon. Ŝajnas ankaŭ ke en tiu eposo troviĝas la originalo de la greka mito pri Adoniso.

Mi citu kelkajn liniojn kiel ekzemplon de la poezia stilo:

Ŝi batalis senpaŭze, poste rigardis;
Anat militis, poste vidis.
Ŝi ridis aplombe,
Ĝojo plenigis ŝian koron,
Ĉar en la manoj de Anat estis venko.
Ŝi vadis ĝisgenue en la sango de soldatoj,
Ĝiskole en la sango de batalistoj.

La ripeto de frazoj, kun ioma

ŝanĝo de la vortoj sed ne de la ĝenerala senco, tre oftas. Ankaŭ de tempo al tempo ripetiĝas laŭvorte aŭ preskaŭ laŭvorte sinsekvo da frazoj. Ekzemple, en la unua eposo estas citita mesaĝo kiun la Sinjoro sendas al Anat. ßi okupas dudek liniojn kaj komenciĝas per "Vi, amanta militadon, verŝu amikecon sur la grundon..." ßin la mesaĝistoj poste transdonas per precize la samaj vortoj; kaj Anat mem dufoje ripetas kun adapto la unuajn kvar liniojn: "Mi, amanta militadon, verŝos amikecon sur la grundon..." Oni povas imagi la recitiston ame elruligi la bone sciatajn frazojn. Ni Anglalingvanoj faras same per "The House that Jack Built" aŭ "The Twelve Days of Christmas"

Oni povus rigardi ĉi tiun libreton simple kiel interesan ekvidon sur la antikvan antaŭaĵon de popularaj televidaj dramoj. Tamen ĝi estas ankaŭ verko de klereco. Tio aparte evidentiĝas en la ĝenerala enkonduko kaj la notoj pri la tria eposo. Kompreneble estas konsilinde ke oni legu tiujn eksplikojn antaŭ ol turni sian atenton al la versaĵoj: tiel oni antaŭatingas iom da kompreno de la historia kaj kultura kuntekstoj kaj trovos pli interesaj la poeziajn rakontojn mem. Sed oni povas ankaŭ kun profito relegi la komentariojn poste, kiam ili havos eĉ pli da signifo.


Resume, ĉi tiu volumeto meritas ne simple legadon, sed ankaŭ studadon. ❑

NI GRATULAS

En *Internacia Ĵurnalisto* 4/95 ni legas:

> *[Pri enigmokvizo en antaŭa numero] Venis entute 31311 respondoj, el kiuj tamen nur 1438 estis ĝustaj. Ni do lotumis la nepromesitan premion, sed la lotomaŝino kolapsis, tiel ke bedaŭrinde ni ne povas atribui premion.*

Kompateme, la prafilo de Ŝejko Al Aba Ko (vidu nian paĝon 12 ĉinumere) bonvolis doni parton de sia premio al la ceteraj 29873 negajnintoj. La premion liveros al ili la 174 redaktoroj laborantaj en la ĉefoficejo de *Antarktika Esperantisto*. Foto ĉidekstre.



Fotis Odlo Bokserp

LA KUNULARO DE L' RINGO

Recenzas Donald Broadribb

La Kunularo de l' Ringo, de J.R.R. Tolkien. Tradukis William Auld. Jekateringburg (Rusio): Sezonoj, 1995. 544p., bind.

Ĉi tiu estas parto 1 de la verkego *La Mastro de l' Ringoj*. La romano estas nun jam klasika verko Anglalingva; la tradukinto estas eminenta poeto Esperantista.

La stilo kaj lingvuzo estas vere bonaj. La teksto glate legiĝas kaj malofte perfidas ke temas pri traduko. Tre trafa estas la traduko de la simbolhavaj nomoj, kiuj abundas.

La romano estas fantazirakonto pri eventoj en "Mez-Tero", kiu estas simila al nia Tero sed kun loĝantaro konsistanta el Hobitoj, Elfoj, Gnomoj, kaj aliaj estaĵoj, krom homoj.

Ĉefrolas Frodo, Hobito kiu akiris de sia amiko Bilbo magian ringon unue kreitan de Saŭrono la Granda, personigo de l' malbono (Pri kiel akiris la ringon Bilbo temas pli frua romano *The Hobit*, ne eldonita en Esperanto.) Grave rolas ankaŭ Gandalfo, sorĉisto; diversaj magikapablaj estuloj; kaj malpli ĉefe amikoj de Frodo. La tasko estas ĵeti la katastrof-okazigantan ringon en certan vulkanon, la sola metodo detrui tiun ringon kiu detruas siajn portantojn. Saŭrono strebas reakiri sian ringon, do la tasko ne estas facile plenumebla.

Pro sia grandeco kaj rakonta stilo, ĉi tiu libro ne estas rapidlegaĵo. Ĝi lante, sed ĉiam interese, permesas ke ni akompanu Frodon. Temas pri moderna reverko de la rakonto pri la Ringo kiun operigis—egallonge—Wagner, kvankam estas malverŝajne ke Tolkien konscie konceptis tion.

Tolkien verkis ĉi tiun romanon dum multaj jaroj, kaj iom post iom rakontis la tekston al siaj infanoj dum li verkis ĝin. Tiu pravoĉsono allogas ankoraŭ per sia fidela speguliĝo en la tradukita verko.

Mi ne forgesu komenti ke la versaĵoj (kelkfoje iom Winnie-la-Pu-ecaj) estas lerte redonitaj en la traduko, kio ne surprizas kiam ni atentas la nomon de la tradukinto.

Multerilate eblas kritiki la romanon. ßi estas preskaŭ 100%e nurvira. Neniu "ordinara" virino rolas en ĝi, kaj nur unu neordinara: Damo Galadriela, elfreĝino, kiu estas—malsimile al ĉiuj aliaj roluloj—idealigita magiulino, vera enkarniĝo de la mitologia "anima" figuro kian distingis Jung. Ĝenerale: "maĉismo"[1] karakterizas la verkojn de Tolkien.

Tre malforta estas la kapablo de Tolkien krei kredeblajn rolantojn. Ili estas tre kartonecaj. Kiom mankas kredeblaj personoj, tamen, tiom kompensas tre vigla kaj viva agado senspirige atentokapta.

Domaĝe ke la papero kaj bindo estas aĉaj. ❑

[1] El la hispana vorto "macho" = virseksulo. "Maĉismo" estas ideologio kiu valorigas nur tion kio estas virseksega.

VENENO KARA

Recenzas Vera Payne

Veneno Kara de Mary Webb, tr. Grace Kirkwood, editoris Donald Broadribb. Sendialekta versio de *Malbeno Kara*. Beverley WA: Bookleaf Publishing, 1995. 145-A4 paĝoj. $30 de la Libroservo de AEA.

Precipe kontentigas la literograndeco kaj la du kolumnoj sur ĉiu paĝo.

Verŝajne la hodiaŭaj gejunuloj, kaj des pli la infanoj, konsideras la surpaperan informaĵon tre malrapida informilo. Por ili la komputilo ege superas la libron. La Internet kaptis ilian respekton kiel mondvasta informofonto. Lastatempa esplorado malkovris ke eĉ iliaj okulmovetoj malsamas disde tiuj de presliterlegantoj. Nu, jen la estonteco jam ĉe ni, laŭdinda kaj ebleco-senfinoplena.

Tamen, oni ne povas kunpreni komputilon en la liton, nek sub tropikinsulan palmon. Kaj tiaj "tujeculoj", se ili entute forlasos librojn, neniam konscios la plezuron kian proponas romano kia, ekzemple, *Veneno Kara*, kies ĉiu vorto bezonas respektoplenan gustumon, kaj ĉiu frazo pripenson.

Kiel mi skribis en la recenzo pri *Malbeno Kara*, la aŭtoro, Mary Webb, premiiĝis en 1924-5 pro *Precious Bane*, kiu estis juĝita la plej bona fikcia verko priskribanta la Anglan vivon. Ŝi kaptis la etoson pri la komenco de la 19-a jarcento, teksante belegan rakonton pri tiu epoko, tiom detalan ke ĝi estas kvazaŭ por-kino-preta.

Mi trovis *Veneno Kara* tute neformetebla. Ŝia antaŭulo, *Malbeno Kara*, estis "alia sitelo da fiŝoj"[1] ; ĝi fortimigis pro la dialektigo. Jam leginte ĝin, kune kun la ŝropŝira originalo, mi nun ĝuas *Veneno Kara* kiel ĝuas infano amatan, jam plurfoje aŭditan rakonton.

Jen verko bela kaj fajna kiel rosokisita rozo, samtempe jen malico, manio, mizero, eĉ murdo. Jen homoj diecaj, kaj homoj superstiĉoplenaj kaj diable kruelaj. Jen laŭdindaj deziroj kaj averto kontraŭ malmoderaj ambicioj. Jen libro kiu lasos vin animtuŝita. *Veneno Kara* ravas min, kaj mi dubas ĉu troviĝos libroamanto inter vi kiun ĝi ne fascinos. Aĉetu, gustumu, ĝuu. (Ke via vortoposedo kreskegos, mi nepre promesas.)

[Ĉi tiu verko estas traduko de la romano *Precious Bane*. La origina romano, Anglalingva, estis verkita en modifita dialekto de la Angla regiono Shropshire. En 1994 traduko en dialekteca Esperanto estis eldonita, recenzita en *ESK* jan-feb. 1995 p.13. La nun recenzata verko estas traduko en normala Esperanto.—DR] ❑

[1] Anglalingva esprimo, = "io tute alia".

3a INTERNACIA LITERATURA KONKURSO POR JUNAJ KOMPUTILOJ

De Odlo Bokserp

La 3a Internacia Literatura Konkurso por Junaj Komputiloj okazis en julio. Ĝin sekvos en 1996 la 1a Internacia Literatura Konkurso por Junaj Komputiloj, kaj en 1497 la 5a.

Oni esperus okazigi la kvinan kaj kvaran ĉiujaran konkurson en 1398 kaj 1899 respektive, se montriĝontintus sufiĉe da intereso.


Bedaŭrinde, neniu poemo estis sufiĉe mezkvalita por meriti la sepan premion, sed ĉijare ricevis la unuan premion juna Makintoŝa komputilo el Monako, ĝis nun eremito loĝanta en la dezerto malantaŭ la Kazino. Ŝlia[7] premiita poemo tekstis:

Brile brilis la brila Sunbrilo,
Dum mile ĉilis l' aĝila filo.
Sed nokta lukto kun vokta rukto
Okazis sub la dilo.

La en neniu vortaro listigita neologismo, postulata de la reguloj de poeziaj konkursoj, estas "aĝila".

Laŭ la verkinto, "aĝila" signifas "lerta, aktiva, subtila, energia, kreema, entreprenema, inĝenia, inventema, Ruza".

La ĉefjuĝisto de la Konkurso kaj patro de la premiito, Toma T.A. Pomo-d'Oro, anoncis samtempe la geedziĝon de lia filo kaj F-ino Ana Stazia.



Portreto de praavo de la premiito, Ŝejko A Ba Ko, inventinto de la matematiko. Lia kuzo estis Lia Fuma Moŝto Ta Ba Ko. (En la Louvre. Pentris Leonardo da Vinci.)

La fianĉiĝo okazis surbaze de la lasta, misliterumita, sinonimo en la citita gloslisto, kiu pruvas la Rus-parencan rilaton.

La Internaciaj Konkursoj jam estas mondkonataj pro dektri jarcentoj da nepartopreno de la plej eminentaj poetoj tutmonde aklamataj.

Inter ili estas William Blake, T.S. Eliot, Homero, kaj Baudelaire.

Aplaŭdis la premiiton Kuk Al-Rumo, la fondinto de la premiado.

Ne aplaŭdis la spageto-magnato Al-Dente Alighieri, kaj edukistino Mia Silabado.

La premiojn aljuĝas la Antarktika Komisio de la Internacia Konkurso de Literaturo, post voĉdono okazanta dum Oficiala ßenerala Pikniko.

La komision fondis la fama filozofo kaj gastronomo, Kuk Al-Rumo.

Kuk Al-Rumo enkondukis la drinkadon de alkoholaĵoj ĉe ĝeneralaj piknikoj, en la 10a jarcento.

Prezidento Abacoda de la Respubliko Efogo, 2^2-metra insulo en la

[36] Makintoŝaj komputiloj estas duseksaj; PC-komputiloj estas nur viraj, krom se ili por siaj matematikaj taskoj spertis operaciojn en Danio.

Norda Pacifiko, kaj mem furora poeto, diris ke la premio estas sendube fiŝoriĉa".

Prezidento Abacoda estas la aŭtoro de la verko *M Estas Por Mano*, populara porinfana verslibro.

laŭ David Attenborough, kafo bezonas esti brodgita dum almenaŭ tri

---

UNIVERSALA KONGRESO 1997 EN ADELAJDO

Dianne Lukes

11 aŭg 1995

Karaj legantoj,

Ĉu vi jam aliĝis al Amikoj de la 82a Universala Kongreso de Esperanto en Adelajdo 1997? Se ne, jen oportuno.

Ni ĉiuj konas la proverbon "havi vian kukon kaj ankaŭ manĝi ĝin". Mi opinias ke ni povas inversigi ĝin. Ni povas uzi nian monon—kontribuante ĝin al la fonduso—kaj poste rehavi ĝin kiam ĝi estos redonita. Tiel la sama mono estos uzita dufoje. Kompreneble, ni ne estas certaj ke la Kongreso donos profiton, sed mi fidas ke la Kongreso tre sukcesos.

Mi esperas ke la Amikoj povos festi kune post la UK en Adelajdo, ĉu ne?

La celo de la Fonduso

Provizi monon por progresigi la Esperantan lingvon en Sudaŭstralio ekde julio 1996.

La LKK de la Sudaŭstralia Esperanto-Societo rajtas sola uzi la monon laŭ sia bontrovo. La fonduso estis komencita por ricevi kontribuojn ekde julio 1995 ĝis julio 1997.

La mono pruntedonita al la fonduso estos redonita el la Aŭstralia parto de la profito restanta post la Kongreso, proporcie al la kontribuo. Ĉi tiu mono estos redonita antaŭ ol iuj aliaj donacoj estos faritaj.

Stato de la Fonduso 11 aŭgusto:

Mi jam investis $3400, kaj ankaŭ ricevis promesojn je $1750 pli.

La ĝisnuna Honorlisto de Amikoj:

Joffre Bell
Jenny kaj Alan Bishop
Jim Jones
Jean Lehane
Owen Loneragan
Dianne Lukes
Tom O'Grady
Merle Packham
Peggy kaj Ray Ross
Frank Swift
Connie White

Se vi volas vidi vian nomon en la listo, bonvolu sendi ĉekon al Dianne Lukes, ĉe la adreso:

c/o Post Office
Meringandan Qld 4352

Pagigu la ĉekon al *Friends of the 82nd Universal Congress of Esperanto.* ❑

KONGRESAVENTUROJ

De Kep Enderby

Unue Southport

Nia AEA-Kongreso iris glate kaj sukcese en Southport. Proksimume 45 partoprenis.

Bedaŭrinde, kvankam 10 Ĉinaj Esperantistoj estis invititaj ĉeesti, kaj spite ke ili petis al nia Ambasado en Pekino por havi vizojn, vizoj estis rifuzitaj. Pli pri tio poste!

Bonega parolado pri "Toleremo" estis donita de emerita Profesoro Ron Gates.

Bedaŭrinde, ankaŭ la aranĝoj faritaj de mi por ke televidostacio registru nian malfermon fuŝiĝis, ne pro nia kulpo sed pro tiu de la stacio en Southport.

Tamen, feliĉe, la stacisinjorino en Sidnejo, kiu provis aranĝi la aferon por ni, ankoraŭ volas helpi nin, kaj espereble ni povos fari aranĝon en Sidnejo iom poste en la jaro.

Estos grave por ni se ni povos ankoraŭ efektivigi ĝin, ĉar la televida programo, *Eleven A.M.*, elsendiĝas tutnacie. Dum la Kongreso okazis bona kaj vigla diskutado pri niaj preparoj por la Universala Kongreso 1997 en Adelajdo. Unu afero kiu diskutiĝis: la plimulto indikis preferon ke estu kanguruo en nia elektota simbolo, anstataŭ ornitorinko, aktuale la simbolo preferata de la LKK.

Poste Slovenio

Tuj post la AEA-Kongreso Doroteo kaj mi forflugis por ĉeesti la SAT-Antaŭkongreson en Preddvor, Slovenio, unu el la kvar eks-Jugoslaviaj respublikoj. Unu el miaj memelektitaj taskoj tie estis propagandi nian 1997-an Adelajdan Kongreson.

Krom Doroteo kaj mi el Aŭstralio, ĉeestis Bernie Heinze el 24 "Satanoj" (Membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda) en Preddvor, venintaj el Aŭstralio, Aŭstrio, Britio, Francio, "Jugoslavio", Litovio Nederlando, Svedio. "Jugoslavio", almenaŭ nome, laŭ Unuiĝintaj Nacioj nun konsistas el nur Serbio kaj Montenegro.





La regiono Preddvor ĉirkaŭ kiu ni ekskursis estas ja belega! Belaj altaj montoj ĉirkaŭantaj belajn trembrilantajn klarajn bluajn lagojn.

En Preddvor, el la prelegoj la plej interesa laŭ mia gustumo estis tiu de Zlatko Tišljar (Kroato kiu nun loĝas en Slovenio kaj kiu, inter amikoj, preferas nomiĝi "Pajo"). La parolado temis pri la kaŭzoj de la disfalo de la malnova Jugoslavio kaj la aĉa milito kiu ankoraŭ daŭras nur 300 kilometrojn sude. La kvalito de lia prelego, en objektiva senco, inkluzive kaj la lingvan nivelon kaj la enhavon, estis tre alta.

Samtempe kiam okazis la prelegoj la milito aktivegis. La Bosniaj Serbaj fortoj sude ĵus atakis sukcese la urbeton Srebrenica, nomatan "sendanĝera loko" protektatan de UN-Nederlandaj soldatoj. La soldatoj ne povis malhelpi la atakon kaj la Serbaj fortoj sukcesis forpeli el tie la Muslimajn familiojn, krom tiujn virojn kiuj havis kapablon batali. Tiujn virojn ili forprenis, kien neniu scias. Je la tago de nia foriro el Preddvor tiuj ĉi Serbaj fortoj estis atakantaj alian urbeton Jepur, protektatan de Ukrajnaj soldatoj de UN.

Mi registris la prelegon sonbende kaj sendos ĝin al Svetislav Kanaĉki en Melburno por uzo en Radio 3ZZZ.

Alia bona preleganto en Peddvor estis Ivica Špoljarec kiu, pro la prononca malfacilo, lasis nin simplajn fremdulojn nomi lin "Stef". Stef estas granda mond-vojaĝanto kiu elspezis iom da sia tempo en Sud-Ameriko precipe en Brazilo kaj Bolivio. Hobie li estas poeto.

Interesa aspekto de nia vizito al Preddvor estis trovi kiel Pajo kaj, eble je malpli granda grado, Stef povas gajni siajn vivrimedojn profesie iagrade pere de la uzo de Esperanto. Zagrebo ne estas malproksima, kaj tie ili kune kun la pli bone konata Spomenka Štimec starigis Internacian Kulturan Servon kiu sukcese daŭras kaj multe uzas Esperanton.

Post la Antaŭkongreso en Preddvor ni estis veturigitaj al Maribor, la dua urbo en Slovenio post Ljubljana, la ĉefurbo. Maribor havas proksimume 130 000 loĝantojn. La SAT-Kongreso en Maribor estis la 68a de SAT kaj la 3a kiun Doroteo kaj mi partoprenis.

Denove mi provis propagandi nian Adelajdan Kongreson kaj tiuteme distribuis broŝurojn laŭdantajn Adelajdon. Ĉiuj rapide elĉerpiĝis! Multaj SAT-anoj entuziasme volas veni al Adelajdo, kvankam mi anticipas ke por multaj la kosto, pro la distanco, estos tro alta.

La temo de la SAT-Kongreso estis "Tolero al Minoritatoj". Tre taŭga, kiam ni konsideras la situacion en tiu parto de la mondo. Rimarkindas ke la temo similis tiun de Profesoro Ron Gates en Southport!

La ĉeestantaro de la Kongreso en Maribor estis unu el la plej malgrandaj en la historio de SAT. Nur 152 venis, el 27 landoj. Multaj opiniis ke la kialo por la malgrandeco estis timo pri la proksimeco de

HOME THOUGHTS FROM ABROAD

By Max Wearing

It is not nostalgia for the beauties of Australian nature that called the thoughts back to Australia from the Universala Kongreso (Universal Congress) of 1995—the forests and lakes of Finland are ravishing, despite the mosquitoes! What we most yearned for was Australian prices. Everything in northern Europe this year seemed to cost at least twice as much as at home.

Yet the Europeans constantly complain,"Australia is so far away! We really want to attend the Congress there in 1997, but how can we possibly afford it?" To reply that Australians who want to attend international Esperanto congresses have to scrimp and save every time is about as effective as suggesting to M. Jacques Chirac that France conduct its "perfectly safe" nuclear tests under the Arc de Triomphe instead of in the Pacific.

We Australians have long taken into account the fact that $2000 or $3000 is a lot to spend in one year just for the basic travelling and insurance expenses to attend a Universal Congress in the northern hemisphere. Many of us try to fit in as many other Esperanto events as we can while we're there. Though there is a shortage of Esperanto events in the southern hemisphere around the time of the Universal Congress, at least ILEI (the International League of Esperanto Teachers) wants to hold its conference within a week or two of the 1997 Universal Congress (UK'97) and in Australia! Discussions are under way to bring this about. Furthermore, there is talk of officially launching the full television version of *Mazi en Gondolando* during the UK'97 or ILEI conference. Anyone with practical suggestions about how this might best take place (through SBS or ABC television, for example) is invited to contact the Australian Esperanto Association Committee or the Local Organizing Committee (LKK) for the UK'97 immediately.

Unfortunately the chance that the annual congress of TEJO (Worldwide Esperanto Youth Organization) will be held either in Australia, in a neighbouring country, or even in a potential stop-over city for visitors to Australia, is almost nil. It would appear that the leadership of TEJO is less enterprising and more Eurocentric than ever: any mention of such possibilities evokes cries about how much TEJO lost when it held a recent congress even in not so far distant Canada! Unfortunately all TEJO's present leaders except one are Europeans, who would find it more comfortable to hold the

1997 congress in a country like Italy. Yet the UK'97 might hope to attract many Koreans, Japanese and other Asians; and some Asian countries, particularly Korea, have a large percentage of young people among their Esperantists. Is there a way of organizing an Esperanto youth event of significant size in Australia or its vicinity just before or just after the UK'97? If so, could this be used to hasten the true internationalization of TEJO? Let us hear of any specific proposals you may have.

In contrast with these observations is the constant enthusiasm and support voiced by most UEA officials and the staff of UEA's central office in Rotterdam. It was almost embarrassing in the Tampere congress, indeed, to be invited to begin promoting Adelaide's 1997 Congress. There is no doubt that the Australian promotion attracted more attention than the one by our Czech neighbours. This was partly because the video film and the motivational brochures funded by the Australian Tourist Commission (and transported free of charge by Qantas) were attention grabbers. Initial interest has certainly been captured. We can only hope that it will be sustained and that potential delegates will begin saving early.

Good news on the youth front in Finland was the success of the "High School" held during the ILEI conference in Ovik in the week following the Universal Congress in Tampere. This event, mostly for teenaged native speakers of Esperanto, who receive a full week's secondary level instruction in various arts and sciences from some of the world's best Esperanto teachers, was introduced into the ILEI conference a few years ago by outstanding Esperanto teacher trainer Mrs Zsurzsa Barcay, a member of the Esperanto department of ELTE University in Budapest. It was decided not only to continue this extraordinarily successful event in future years but also (upon the suggestion of Cuban Esperanto methodologist Julián Hernández Ángulo) to add a "high school class" for beginners.

This would seem to me to have useful implications for UK'97 in Adelaide. For the 1996 Australian Summer School, the overseas teacher will be Esperanto methodologist Katalin Smideliusz. If, in conjunction with the *EKPAROLI* teachers, we could in our next two Summer Schools make a very serious campaign to increase our numbers of both teachers and beginners, we might lead up to unprecedented emphasis in UK'97 on recruiting and teaching newcomers to the language—probably the greatest contribution UK'97 could make to progress of Esperanto language and culture here.

On the subject of overseas teachers for the Summer School, I might mention in passing that at least two outstanding teachers have already expressed an interest in being here at that time: Dr So Gilsu, a Korean economist, who has already taught here; and Dr Amri Wandel, a nuclear physicist from Israel, father of native speakers of Esperanto, and a former visiting teacher at the State University of San Francisco's Esperanto Summer School. In addition there has been some interest expressed in approaching other outstanding teachers, e.g. Zlatko Tislja from Zagreb.

At our 1996 Summer School participants will be able to view a fascinating film by Tislja of Esperanto events in central Europe—along with newly acquired videos on Universalaj Kongresoj in Warsaw, Vienna and Seoul.

This year's UEA Executive Committee meeting in Tampere formally accepted the proposed new regulations and procedures relating to the mounting of Universal Congresses, so the busy-ness of the final two years' preparation now begins in earnest. One of our early tasks will be to identify at least 25 of the key translators and workers for UK'97 in Adelaide. These workers will be heavily involved in activities like meeting and settling in the overseas delegates and acting as interpreters during excursions. Please don't be shy about offering your services to me or to other members of the organizing committee. It appears to be UEA's practice to refund the membership fees of about 25 of the most active participants.

This year's experiment of greatly increasing the number and length of pre- and post- Congress excursions seems to have been a success and therefore worth repeating for UK'97.

The director general of UEA, Simo Milojevic, arrived in Adelaide on October 22. He announced that he has now signed a contract which makes Qantas the official airline carrier for the UK'97 in Adelaide.

He was joined by Justice Kep Enderby, president of the Australian Esperanto Association, who flew in from Sydney. They have been meeting Adelaide Esperantists and members of the Adelaide Convention and Tourism Authority and staff of the Adelaide Convention Centre.

At time of writing, Mr Milojevic is planning flights to Melbourne and Sydney for further meetings with Australian Esperantists, while Justice Enderby plans to spend the weekend at the Esperanto seminar in Toowoomba.

AUSTRALIAN AMBASSADOR RE ESPERANTO

By Ralph Harry

After the 80th World Congress of Esperanto, in Tampere, Finland, in July, 1995, attended by 2443 Esperantists from 68 countries, I sent a report, with a copy of the Congress Resolution, to the Minister for Foreign Affairs, Senator Gareth Evans, with a copy to the Australian Ambassador to Finland, resident in Stockholm, Dr Robert Merrillees.

Dr Merrillees, a distinguished diplomat, archaeologist and linguist, commented:

"The need for a language that transcends national boundaries and has no nationalistic connotations is becoming increasingly obvious, nowhere more so than in the European Union. It is ironic that a regional association which likes to think of itself as united is sinking into a morass of interpreters, translators and paper. The cost of satisfying the linguistic demands of its members must exceed the budgets of some of the world's smaller countries.

"It is perhaps more than co-incidental that Finland has reintroduced the use of Latin into its public life through news broadcasts in that language, and played host to your World Congress of Esperanto."

AUSTRALIA POST AND THE UK'97

It is important that we arrange with Australia Post for official postal recognition to be given to the Universala Kongreso 1997 in Adelaide. Australia Post has informed us that we cannot have a postage stamp issued to commemorate the Congress, but a cancellation postmark and a pre-paid envelope are possibilities. Please lobby Australia Post now, if you have not already done so. The address is:

The Manager, Philatelic Group
Australia Post
GPO Box 1777Q
Melbourne Vic 3001

If you wish to know more about Esperanto, or to examine the possibility of learning Esperanto through a correspondence course, we suggest you contact:

John Moore, 7 Pelican Place, Emu Park Qld, 4702.

milito.

Tamen, malgraŭ la malgrandeco de la nombro, la etoso en Maribor estis laŭ la sama kutima alta kvalito kia en ĉiuj antaŭaj SAT-Kongresoj, kaj la nivelo de la parolata lingvo estis egale alta.

Simpozio organizita de "Pajo" inkluzivis prelegojn faritajn de profesiuloj. Temoj, inter aliaj, estis "Minoritatoj en Ĉinio", "Hungara minoritato en Slovenio", "Lingvo, individua kaj grupa identeco kaj kulturo", "Politiko kaj fremdlingvoj", "Etiko kaj socio", kaj "De toleremo al persona kaj kolektiva identeco". "Pajo" meritas gratulojn pro sia laboro kiel preleganto kaj tradukanto. Ĉiuj prelegoj estis provoke altkvalitaj.

En Finnlando

Post Maribor, Doroteo kaj mi vojaĝis al Tampereo por propagandi nian UK-1997 en Adelajdo kaj diskuti pri ĝi kun la officistoj de UEA.

La Tamperea Kongreso ankaŭ estis granda sukceso. Partoprenis proksimume 2400 Esperantistoj el pli ol 65 landoj. 11 Aŭstralianoj partoprenis.

Sobriga estis la fakto ke lokaj Finnaj Esperantistoj disponis pri 40 ĉiĉeronoj por siaj ekskursoj! Samtempe, ĉiutage ilia LKK ĉiam havis multajn deĵorantojn. Ĉiam laborantaj en la budoj kaj giĉetoj estis 20 deĵorantoj. En la libroservo estis neniam malpli ol 10 deĵorantaj Esperantistoj. Plejparte ili estis lokaj Esperantistoj.

Max Wearing kaj mi partoprenis diskutojn kun Simo Milojević, la ĝenerala Direktoro de UEA, Michela Lipari kaj Nikola Rašič kiuj respondecas pri Kongresaj Aferoj.

Max Wearing, al kiu mi emfaze dankas pro ĉio kion li faris dum la Kongreso, kaj aliaj Aŭstralianoj — Jennifer Bishop, Bob kaj Audrey Felby, Colin Giles, Ralph Harry, Terry Metherall—multe helpis propagandi Aŭstralion eksterlande.

La vidbendo pri Adelajdo estis bone akceptata de ĉiuj rigardantoj.

Du Ĉinaj Esperantistoj proksimiĝis al mi por diri ke ili estas du el la dek kiuj malsukcesis gajni vizojn por ĉeesti nian AEA-Kongreson! Unu el ili, S-ino Song Ping, instruas la Anglan en lernejo en Ĉinio; ŝi volas ankaŭ partopreni la Someran Lernejon en Adelajdo venontan januaron, kaj timas ke ŝi ree ne gajnos vizon.

Sed Aŭstralio ne estas la sola lando kiu rifuzas vizojn. Ne gajnis vizojn por Finnlando kelkaj personoj en Ĉinio, en kelkaj orienteŭropaj landoj, kaj en Afriko. Domaĝa kaj maltrankviliga afero!

Unu el miaj taskoj nun estas daŭrigi la jam okazintan korespondadon kun niaj Aŭstraliaj ministroj kiuj respondecas pri tiaj aferoj, por trovi taŭgan solvon aŭ sistemon laŭ kiu ni povos eviti aŭ almenaŭ malpliigi tian problemon en 1997.

Ni informiĝis en Tampereo ke la 5a Pacifika Esperanto-Kongreso, kiun ni supozis okazonta en Vladivostoko en 1996, ne okazos. Ĝin anstataŭos Unua Azia Kongreso en Ŝanhajo, 22-25 aŭgusto 1996.

Ankoraŭ pri nia Adelajda Kongreso: Ŝajnas al mi ke la plejmultaj Eŭropanoj, Amerikanoj (nordaj kaj sudaj) kaj Azianoj posedas malmulte da scio pri nia nuntempa aktuala Aŭstralia socio. Eĉ tio kion ili "scias" estas misa.

Ili havas iom da scio pri kelkaj ikonoj de Aŭstralio, ekzemple la haveno de Sidnejo, la Havena Ponto, la Opera Domo, la Granda Barila Rifo, kaj Uluru, kaj kelkaj aliaj, sed ne pli ol tio.

Ili scias nenion pri la historio de nia lando kaj la aktuala buntega multkultureco kiu nun regas ĉi tie. Plej ofte ili erare supozas ke ni ankoraŭ estas, krom la indiĝenaj popoloj, preskaŭ ĉiuj Britdevenaj.

Por provi ĝustigi tiun eraran impreson, mi intencas provi persvadi la UEA-estraron lasi min paroladi pri tiuj aspektoj de la moderna Aŭstralia vivo, en la venontjara UK en Prago, kiu estos la lasta antaŭ la nia en Adelajdo.

Sekve de la sama konstato, mi jam komencis provverki mallongan historion de Aŭstralio, kiel broŝuron disdoneblan en Adelajdo.

Kaj poste

Post la Kongreso en Tampereo, Doroteo kaj mi aliĝis al grupo de 34 Esperantistoj el 13 landoj, organizita de Lucy Harmon el Usono, kiu vojaĝis tra Rusio. Ni, kaj aliuloj, veturis ŝipe, rivere, lage, kluze, de Sankt-Peterburgo ĝis Moskvo.

En Sankt-Peterburgo mi renkontis lokajn Esperantistojn kaj inter ili, tute hazarde, viron kiu estas "Satano" kaj kiu kiel Rusa maristo vizitis Aŭstralion, kaj tie kiel Esperantisto renkontis Steve Cooper, Esperantisto en Sidnejo. Steve estas sindikatisto tie. La ŝipvojaĝo en Rusio estis tre interesa. La ŝipo havis proksimume 250 pasaĝerojn. Krom la 34 Esperantistoj, ili venis el multaj landoj. Konsekvence de tio, ni aŭskultis pri la okazontaĵoj de la tago ĉiumatene en Esperanto kaj la Angla, Germana, Korea, kaj Rusa, pere de la ŝip-laŭtparolosistemo. Bil Harmon de Usono bonege parolis la Esperantan version.

Resume

Entute la tuta vojaĝo sukcesis kvankam ĝi memorigis min pri la grandeco de nia tasko prepari nian Adelajdan Kongreson en 1997.

Por tion fari bone, ni bezonos havi tiom da helpo kiom ni povos havi.

Sekve de tio, estus granda helpo eĉ nun por la LKK, havi takson pri la nombro da niaj Aŭstraliaj Esperantistoj kiuj intencas ĉeesti en Adelajdo. Kaj konstati kiom el ni estos pretaj labori dum la Kongreso: aŭ deĵorante ĉe budoj aŭ giĉetoj, aŭ kiel ĉiĉeronoj.

Ankaŭ gravas: kiom inter ni konsentos alveni ĉe la Kongresejo pre-fere unu semajnon antaŭ la komenco, por iom da praktika trejnado kiel, ekzemple, ĉiĉeronoj?

Kiuj povas nun doni tiajn indikojn, eĉ provizore, bonvolu informi Max-on. ❑

Skribas La Legantoj

Terry Manley:

Mi skribas al vi ĉar mi ne certas al kiu alia skribi, ĉu al la LKK? Ĉu al la estraro de AEA? Iakaze la mesaĝo atingos ilin per nia fidinda gazeto *ESK*. Temas pri la kolektado de informoj por la UK en 1997. Eble tiu temo estis jam diskutata multfoje kaj mi ne aŭdis pri la resultoj. Mi scivolas ĉu iu kunligas la laboron de la Esperantistoj en la dise foraj lokoj. Ekzemple, mi faris mallongan paroladon pri nia kara ornitorinko en la Sidneja klubo kaj registris resumon per komputila disko. Ĉu iu en alia loko aŭ en alia tempo jam verkis similan? Ĉu Kay kaj Fay en Kvinslando nun prilaboras kantojn (kiel ĉiam) por nia kongreso? Ĉu Margaret Furness prilaboras verkon pri la domostiloj de Sudaŭstralio?

Estas multaj temoj Aŭstraliaj verkindaj. Historiaj, turistaj videndaĵoj, botanikaj, bestaj, kulturaj ktp. Mi supozas ke ĉe la kongreso oni povos informiĝi diversteme per komputilaro. Por tio ni bezonos taŭgan komputilprogramon por bone organizi la informon, kaj la informon mem.

Mi rekomendas ke por nun iu kiu verkas aŭ prilaboras taŭgan eron skribu al *ESK* kaj ke la nomo kaj temo estu publikigitaj. Tiel aliulo kiu prilaboras similan pecon povos kontakti kaj eble kunlabori kun la alia. Ĉi tio havas du celojn: Eviti la eblon de multobla laboro kaj instigi aliajn verki pri siaj ŝatataj temoj.

Alan Turvey ankaŭ havas la ideon ke ni povos ekuzi la informon en la Interreto [Internet]. Tio estus bona formo de reklamo por Aŭstralio. Ju pli da informo des pli da intereso pri nia lando. Do ek al la laboro. ❑

ESPERANTO EN AŬSTRALIAJ LERNEJOJ

Ni lastamomente ricevis la ĉisekvan komunikon de Ray Ross:

Esperanto nun estas deviga dua lingvo en la Elementa Lernejo de la Eklezio de la Adventistoj de la Sepa Tago, en Ipswich, Kvinslando. Ĉiuj studantoj partoprenas, kune kun la lernejestro Murray Hunter kaj la aliaj instruistoj, dum unu instruperiodo semajne. La iniciinto kaj instruisto, Karakán Kochárdy, petis helpon de la Brisbana Societo rilate instrurimedojn, kaj poste komencis instruadon la 4an de oktobro. Laŭ raporto de Karakán, ĉirkaŭ 70 gestudantoj entuziasme partoprenis la unuan lecionon. Kompreneble la Brisbana Societo kaj la Kvinslanda Federacio tutkore subtenas ĉi tiun projekton. Dankon al Phil Thompson kiu pruntedonis du Mazi-vidbendojn. Grandan sukceson al ĉi tiu longe atendita evento!

Okcidenta Aŭstralio: Esperanto estos instruata en la (Montessori) Riverlands School, en Middle Swan. Trevor Steele invitiĝis instrui en 1996. ❑

PRINTEMPA KUNVENO EN MASTERTON

Laŭ raporto de Marilyn Henderson



9-10 Septembro: la Esperanto-Klubo de Masterton okazigis semajnfinan kunvenon en la ĉambroj de la Kroketo-Klubo de Masterton. Ni bonvenigis vizitantojn el Auckland, Napier, Pahiatua kaj Wellington. Sekvis serio de tre interesaj eventoj: enesperantaj enigmokvizo, diskutoj, poemdeklamo, dramprezentoj kc. (Detaloj en la venonta *ESK*.) Sur la foto: ĉiu grupo proponas kial kvin ajoj estis en forgesita saketo. Du personoj vice skribas unu vorton ĝis rakonteto estas verkita.

PAUL DESAILLY DISKONIGAS NIAN UK



Paul Desailly indikas la allogon de la Granda Oceana Vojo inter Melburno kaj Adelajdo en la Esperanto-Klubo en Gliwice, Pollando. Li simile prelegis en Katowice, Poznan, Varsovio, Bielsko-Biala, Łodz, Bialystok, Bydgoszcz, Olsztyn, Krakovo, Staszow, Gdynia, Torun; ankaŭ Vilnius kaj Kaunas en Litovio. Li planas prelegi en Prago kaj Budapeŝto.

LINGVA ANGULO

De Alan Towsey

Dum la pasintaj du monatoj mi ricevis demandojn, komentojn kaj proponojn el pluraj fontoj.

Unue, mi citu el letero de nia jam fama Aŭstralia verkisto de krimromanoj, Prof-o Ron Gates:

Unue, laŭ mia kompreno, kiam oni faras kunmetitan vorton, oni ordinare uzas la nudan radikon de la unua elemento: ekzemple, "gazontondi", "ŝarĝaŭto", "frumatene". Tamen, oni povas enmeti gramatikan finaĵon, aŭ por plifaciligi la prononcon (ekzemple, "vangofrapo"), aŭ, malpli ofte, por forigi konfuzon (ekzemple, "maromoro" por distingi disde "marmoro"). Kaj, kiam ne eblas atingi ĉi lastan celon per la enmeto de finaĵo, oni povas uzi dividan strekon (ekzemple "fi-lamento" por malebligi konfuzon kun "filamento").

*Ŝajnas al mi ke en la plejmulto de okazoj la enmetita finaĵo estas tiu de la rilata substantivo en la nominativa kazo kaj la singulara nombro—tio estas, "o". Sed ĉu oni povas esceptokaze uzi la akuzativon? Tiun demandon mi faras pro tio ke kiam antaŭ du-tri jaroj mi inventis la terminon ĉioportilo" por priskribi la platformon hidraŭlike leveblan malantaŭ traktoro (Angle, "carry-all"), amiko (fakte, Ralph Harry) konsilis ke mi ŝanĝu ĝin al "ĉionportilo". Kvankam mi tion faris, mi tamen nun demandas al mi, ĉu ĝi ne estas nekonsekvenca kun diversaj kunmetaĵoj cititaj en **PIV**, ekzemple (paĝo 1177) "ĉiovendejo". Kia estas la regulo?*

Al la ekzemploj cititaj de Prof-o Gates mi aldonas la jenajn: ordona/orhava (entenanta oran ercon), orkolora (havanta la koloron de oro), orpigmento.

Nu, li pravas pri la ĝenerala uzado. Ankaŭ mia ekzemplo supre donita: "ordona", povus konfuziĝi kun la radiko de "ordoni", kaj oni pli bone uzus "or-dona", kun la pli forta akcento sur la unua silabo: or-dona". Same la unua parto de "vango-frapo" kaj "fi-lamento" estas pli forte akcentata ol la antaŭlasta silabo, kie la akcento estas efektive sekundara.

La regulo pri kunmetaĵoj estas do: ĝenerale oni "uzas la nudan radikon", kiel diras Prof-o Gates. La 11-a regulo en la *Fundamento de Esperanto* tekstas simple: "Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino". Kelkfoje, por plifaciligi la prononcon, aŭ por belsoneco aŭ klareco, oni enmetas konvenan gramatikan finaĵon, kiel en "vangofrapo", "nepagipova", "nigrakolora", ktp.

Prof-o Gates pravas dirante ke "en la plejmulto da okazoj la enmetita finaĵo estas tiu de la rilata substantivo en la nominativa kazo kaj la singulara nombro". Oni do diras "librovendejo", kaj ne "libronvendejo" aŭ "lib-

rojnvendejo", kvankam la logiko postulas ĉi lastan.

Sed—ĉiam estas tiu "sed"!—kio pri "sindefendo, sinmortigo, sinregado (self-control), sindona"? Zamenhof mem skribis "Via sindonemo estas senfina". Neniu dirus "sidefendo, simortigo" ktp.—ŝajne ĉi tie la logiko (kaj la instinkto!) venkis.

Kaj kvankam la ekzemploj de kunmetaĵoj en *PIV* kun "ĉio" uzas nur la nominativan formon, mi samopinias kun Ralph Harry, kaj instinkte preferas "ĉionvendejo" kaj "ĉionportilo"—eĉ kontraŭ la ĝenerala uzado.

En postskribo Prof-o Gates skribas ankaŭ: "En mia legado, mi ĵus renkontis la esprimon 'la nigravestitaj edzinoj kaj infanoj' (*Judoj sen Mono*, paĝo 185). Kial ne 'nigrevestitaj'? Ĉu ĉar la radiko estas adjektiva, ne adverba?"

Li pravas—la radiko ja estas adjektiva, sed la gramatika funkcio ĉi tie estas adverba, do "nigrevestitaj" (dressed in black).

Dua demando de Prof-o Gates:

"Due, kiel traduki en Esperanton la Anglan substantivon kaj verbon "beep" (ekzemple, de telefonrespondaparato)? Havante lastatempe la bezonon, mi provizore uzis por la substantivo la esprimon "alttona sono", malgraŭ ke ĝi ne tute kontentigas min. Interese, en la Angla la vorto ŝajnas esti neologismo, ĉar ĝi ne aperas en la vortaroj Chambers de 1943 kaj Concise Oxford de 1950. Laŭ la nuna Concise Oxford, ĝi estas imita vorto, tio estas, onomatopeo. Ĉu, do, oni povus skribi en Esperanto "bip"? Se jes, kian formon alprenus la responda verbo?"

Laŭ la nova *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* de Benson, "beep" = "(small sound, as by digital watch alarm) pepi (int.); pep(ad)o". Tio respondas al la ekvivalentoj de "pepi" en ties normala senco en la Germana kaj Nederlanda. Do "beeper" = pepilo.

Nia estimata redaktoro plusendis al mi la jenan leteron de S-ro Haeng Cho:

Eble oni povus uzi la vorton "idealsana" por "fit as a fiddle". En la Germana oni esprimas la saman ideon per "kerngesund", t.e. "kernsana" aŭ "prasana", do ni tute ne havu longan frazon en Esperanto nur pro tio ke aliaj lingvoj uzas tiajn "kolorplenajn" esprimojn, kiuj cetere analizite tute ne estas logikaj.

Esperanto estu lingvo kiun kompreni povas ĉiu ulo. Ne helpas la disvastiĝon de la Internacia Lingvo, se la komencantoj (kaj ankaŭ lertuloj) devas ankaŭ lerni multe da nelogikaj frazoj kies signifoj estas troveblaj nur en aliaj lingvoj, ne ekestiĝante aŭtomate en Esperanto mem.

Frazoj kiaj "sana kiel fiŝo" ne havas signifon por la plejmultaj Esperantistoj, sed memklarigeblajn vortojn kiaj "idealsana" oni povas

uzi, ĉar ekzemple ĉiu homo havas enmense bildon de ia "idealeco". La deziro atingi "la idealan sanstaton" troveblas, miaopinie, en la menso de ĉiu homo.

Mi ne samopinias. Unue, mi preferas (se oni devas uzi ĝin) la formon "ideale sana". Due, kvankam tiu esprimo ja havas proksimume la saman signifon kiel "fit as a fiddle", ĝi ne havas la saman *efikon*. Kiel mi diris pri "sanega" kiu ankaŭ tradukas la *sencon*, io ŝajnas manki.

La *Grand Dictionnaire Franœais-Espéranto* (Le Puil kaj Danvy): "être plein de santé" (= esti plena de sano)—havi bonegan sanon. Tion mi trovas senviva—io mankas ankaŭ tie.

La vortaro *Nederlands-Esperanto-Nederlands* (Middelkoop): kerngezond — tute sana, sanega. *Wörterbuch Deutsch-Esperanto* (Krause): kerngesund—tute sana, perfekte sana.

En ambaŭ kazoj, io mankas.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto (Wingen): kerngesund—tute sana, *sana ĝis la medolo.*

Ĉi lasta esprimo ja trafas la celon![1] Bildiga, ĝi pli proksimiĝas al la efiko farata de la origina Angla frazo ol ĉiuj aliaj tradukoj, kaj certe estas universale komprenebla. Por ke lingvo estu vivanta, ĝi bezonas pli ol nurajn "logikajn" esprimojn!

Konfeso

En mia artikolo en *ESK* jul.-aŭg. 1995 mi skribis senpense *Kanutecaj* anstataŭ *Knutecaj*. La origina Dana vorto estas *Knut*, sed la Angla vorto estas *Canute* (ankaŭ la franca ekvivalento estas *Canut*), verŝajne pro la Angla malinklino prononci *k* antaŭ *n*, tiom ke ni nun prononcas *knave*, *knife*, *know* [nejv] [najf] [noU]. (Simile al *Canut*, la Francoj ankaŭ enmetis vokalon inter *c* kaj *n* en *canif* (poŝtranĉilo), kiu devenas de malnov-Angla *cnif* (knife = tranĉilo), ŝajne ankaŭ por plifaciligi la prononcon.

Kiel iam diris Byron, citante Horacion, eĉ "Homero kelkfoje ekdormas"... ❑

[1] Pli mallonge, eble "ĝismedole sana"— DB

DEZIRAS KORESPONDI (Daŭrigo de paĝo 6)

// Lilia Cv. GEORGIEVA, ul. Angel Kanćer 39-5-12, 3000 Veaca, Bulgario. 49jara instruistino de matematiko, fiziko—interesiĝas pri ĉiuj temoj.

// JUNTS Kalju, Lääne maakond, Ridela SJK, Parila EE3181 Estonio. 38jara fraŭlo. Kolektas bildkartojn kaj metaljn monerojn.

// Jldiko KOVESDI, Debrec en 4034, Derek u. 140, Hungario. Vidvino kun edziĝinta filo, laboras en malgranda butiko, vendas laborilojn kaj faras librotenadon. Ŝatas ekskursi, naĝi kaj skribi leterojn. Interesiĝas pri kutimoj de aliaj landoj.

// Svetlana EVDOKIMOVA. Sojuzny pr. 20-1-81, Moskva 11396, Rusio. 28jara fraŭlino. Interesiĝas p[ri libroj, vojaĝoj, bestoj, kaj Esperanto. Deziras angleparolantan amikon kiun ŝi povus inviti kiel gaston al Moskvo.

KIUJ MORTIGAS ESPERANTON INSIDE

De Marcel Leereveld

Ili malklere sed sincere aperigadas kvazaŭsciencajn kialojn por la uzo de neologismoj, kaj la kompatinda Esperantistaro kredas ilin. Kial? Ĉar ili ĝenerale estas "altrangaj" kaj kreemaj Esperantistoj. Tiom kreemaj, ke ili nekompetentaj deziras krei pli bonan Esperanton ol tiu de Zamenhof.

Unu el iliaj imagaĵoj estas ke Esperanto bezonas ekstrajn vortojn ĉar la respondaj ideoj ŝanĝiĝis post la tempo de Zamenhof. Ekzemple, ke la vorto **geja* enhavas pliajn aŭ iom malsamajn nocierojn ol la "malmoderna" indikilo *samseksama*. Ilia rezonado estas ke nuntempe oni malsame konsideras kaj juĝas la koncernajn personojn ol antaŭe, aŭ ke la nova vorto enhavas pli da simpatio, kaj speciale pli da varmeco se uzata inter samseksamuloj mem. Kvankam neniel kaj neniam estante samseksama sed longtempe havinte, antaŭ 50 jaroj, bonan (politikan) amikon tian, mi certas ke la sentoj kaj rilatoj inter ili estas baze la samaj nun kiel antaŭe, ĉu ili sin nomas "gejuloj" aŭ "samseksamuloj". Ambaŭ vortoj kreas la saman nocion, kun la aldona nociero de simpatio, ĉe la samseksamuloj, kaj la saman nocion kun aldonaj nocieroj de malsimpatio kaj kompato ĉe mi. Ĉu la vorto uzata estas "geja" ĉu "samseksama" ĉu alia vorto alilingva aŭ ĵargona, ne ŝanĝas mian bildon subjektivan aŭ objektivan pri tiuj homoj. T.n. "gejulo" ne alie konsideras sian amikon ĉu mi nomas tiun "geja" ĉu "samseksama". Ne necesas havi du vortojn por tio. Kio iom malsamas ne estas la vortoj sed mia nocio for de aliies nocio pri la samaj vortoj. Ni tamen ne povas havi malsamajn vortojn por samseksamulo kiam uzata de mi kaj kiam uzata de ekz. samseksamulo. Ni ja ne uzas (se ne speciale bezonataj) malsamajn vortojn por "tablo" se la parolanto pensas pri ronda aŭ malalta tablo dum la aŭskultanto bildigas en la menso kvadratan aŭ longan tablon. Por ĉiu ideo la lingvo, ankaŭ Esperanto, uzas ĝeneralan vorton kaj aldonas signifojn, se necesaj, per adjektivoj, adverboj, aŭ iaj ajn uzeblaj vortoj.

Alia ekzemplo estas "hospitalo" kaj "malsanulejo". En la ĉiutaga vivo "hospitalo" kaj "malsanulejo" signifas por mi la samon, dum ĉe mia amiko, kiu estas profesia soldato, ambaŭ vortoj ĝenerale kreas bildon de milita malsanulejo. Unu vorto sufiĉas, kaj ambaŭ vortoj same kreas iom malsaman bildon en mia menso ol en la menso de mia amiko. Tio estas normala kaj okazas ĉe ĉiuj vortoj.

Same senvalora estas la kialo krei neologismojn pro ilia bela aspekto (sono, longeco, fremdeco). La juĝo de beleco estas tre subjektiva. En etnaj lingvoj unuj ametas uzi longajn vortojn aŭ fremdajn vortojn, dum aliiuj ametas uzi mallongajn vortojn aŭ ĉiutagajn vortojn. Se ni

rajtus ŝanĝi Esperanton laŭ nia gusto (ni maloftege rajtas fari tion en niaj etnaj lingvoj), la nombro da neologismoj centobliĝus, Ĉar ĉiu Esperantisto rajtus ŝanĝi siajn dekojn da "malbelaj" vortoj. Kaj pluraj tre konataj Esperantistoj klopodas fari tion, ĉar ili sentas sin pli kompetentaj lingvisme kaj belece ol Zamenhof. Kaj ili estas nesufiĉe kompetentaj aŭ modestaj por uzi anstataŭe Esperantajn vortojn kunmetitajn, da kiuj eblaj kunmetaĵoj miloj ankoraŭ ne estas uzataj. Bedaŭrinde *PIV* grande helpas murdi Esperanton per la fakto ke ĝi ne klare distingas inter oficialaj vortoj kaj (ofte stulte kaj egoisme) proponitaj vortoj (la neologismoj), tiel ke la ŝafa Esperantistaro akceptas kaj uzas ĉiujn, kvazaŭ ĉiuj estas uzindaj ĉar en *PIV*. □

Komentoj de Donald Broadribb:

Estas interese, kaj eble grave, demandi kial Esperantistoj volas tiom inventi ekstrajn vortojn.

Kontraŭ la ekstraj vortoj:

Kelkaj faktoroj estas evidentaj: Kvankam la oficiala vortlisto de Esperanto enhavas nur ĉ. 4000 radikojn, treege malmultaj Esperantistoj lernis ĉiujn 4000. (Se tio ŝajnas al vi grandega nombro, konsciu ke en la ĉiutaga Angla lingvo oni aktive uzas proksimume 8000 radikojn, kaj konas/komprenas eble 7000 pli.)

Niaj kursoj malofte helpas. Ĉar ili instruas nur malgrandan nombron da vortoj (kutime nur kelkcent aŭ maksimume unu-du mil), plejofte Esperantistoj ekkaptas ĉiun plaĉaspektan vorton kiun ili trovas aŭ (mis)aŭdas, sen scii ĉu aŭ ne ĝi estas normala Esperanta vorto. Bedaŭrige, la granda plejmulto da Esperanto-parolantoj kaj -verkantoj estas lingve ne tre sperta, kaj ĝia vortuzado ne estas bona. Kiam Italo aŭ Franco parolas Angle, la rezulto malofte estas normala Angla lingvaĵo, same kiam la Italo aŭ Franco parolas Esperante, la rezulto malofte estas normala Esperanta lingvaĵo. Kaj simile, kiam Aŭstraliano parolas France aŭ Itale, aŭ Esperante, la rezulto apenaŭ estas modelo de lingvuzado.

Alia problemo estas la deziro "laŭmode" paroli, kio en multaj landoj signifas disŝuti Anglajn vortojn en sian paroladon. Tio donas pseŭdoedukitan karakteron al ilia parolado. Uzi la vorton "geja" kredigas, laŭ ilia imago, ke ili konas la ĵargonon Anglalingvan.

Ofte kutimoj en la hejma lingvo ankaŭ multe influas onian uzadon de Esperanto. Ekzemple, multaj vortoj estas aŭ estis tabuaj en la hejma lingvo, kaj Esperantistoj transportis tiujn tabuojn ankaŭ al sia Esperantouzado. Ekzemple, ĝis antaŭ nelonge samseksamo estis tabua, oni eĉ ofte rifuzis agnoski ke ĝi ekzistas, do oni parolis eŭfemisme, nomante samseksamulon, Anglalingve, *gay*—tiun vorton Esperantistoj fuŝŝanĝis al *geja*, tiel detruante la celon de la Anglalingva eŭfemismo.

Interesas pripensi ke en Esperanto

ankoraŭ neniu klopodis enkonduki eŭfemismon por nesamseksamulo. (Anglalingve, ja. Anglalingve oni nomas tian personon *straight* kontraste al *gay*. Tiu uzo de la vorto *straight* daŭrigas ĝian nun ĝenerale arkaikan sencon "mallarĝa, t.e. "mallarĝemocia" aŭ "mallarĝmensa".)

Tamen:

Pri kelkaj aliaj vortoj oni povas tamen disputi. Kiam temas pri jam oficialaj vortoj, laŭ kiu kriterio oni decidas ke unu vorto estas neuzinda kaj alia ja uzinda? Kiam oni establis la sistemon de oficialaj vortoj, en 1905, la principo estis fari liston da vortoj kiujn ĉiu Esperantisto povas uzi sen riski mis- aŭ mal-kompreniĝi.

La en 1909 oficialigita vorto *hospitalo* ne riskas miskompreniĝi. Se oni ekdecidas uzi ankaŭ duan principon, ke vorto ne estu permesata kiu egalsignifas al kunmetita vorto, oni povus simile diri ke ni forvišu la vorton *domo* ĉar ĝi estas sinonimo de *loĝejo*, aŭ la vorton *mil* kiu ja estas nur sinonimo de *dekcent*.

Kelkfoje pri la taŭgeco de kunmetaĵoj oni povas dubi. Zamenhof opiniis ke *elrigardi* estas sufiĉe klara vorto, do li ne metis la vorton *aspekti* en la Fundamenton. Tamen la ĝenerala Esperantistaro opinis tiun germanisman signifon de *elrigardi* erara, kaj oni oficialigis la vorton *aspekti* en 1909, per la *Unua Oficiala Aldono al la Fundamento*[1].

Tiu sama *Oficiala Aldono* ankaŭ oficialigis la vortojn *hospitalo*, *biblioteko*, *aŭtomobilo*, *aromo*, *he!*, *hipotezo*, *inteligenta*, *kalendaro*, *kanibalo*, *klasika*, *paragrafo*, *revolucio*, kaj tre multajn aliajn. Ĉu ni elĵetu do ankaŭ la vortojn *aromo, hipotezo*, *kalendaro*, *kanibalo*, ĉar ili estas preskaŭsinonimoj de *odoro, teorisupozo, dataro, hommanĝanto*?

Aliflanke, *fakturo*, *korespondi*, *kriminala*, *ripeti, leksikono* estas en la Fundamento. Sed ili signifas tutsimple *pagpostulo*, *leterumi*, *krimrilata*, *rediri/ refari*, *vortaro*. Ĉu ni do forĵetu ankaŭ ilin?

Konsiderindaj pensoj:

Mi malemas anatemi. Kiam temas pri oficiala vorto, negrave ĉu ĝi estas en la Fundamento, ĉu en Oficiala Aldono, por la unueco de nia lingvo estas dezirinde agnoski kaj akcepti ke oni laŭrajte kaj laŭprave ĝin uzas. Se parolanto deziras diri pluvŝirmilo, gastejo, libraro, alilingvigi, kunmeti, malhelpi, nepre tio estas permesenda. Alia persono preferas diri ombrelo, hotelo, biblioteko, traduki, kombini, obstrukci (ĉiuj estas vortoj en la Fundamento). Ankaŭ permesende. Ĉu rekomendende? Laŭ kiu kriterio oni diras ke ne aŭ jes?

Ankaŭ: "Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro ne-*

---

[1] Iom simile, Zamenhof opiniis, en la Fundamento, ke *necesujo* sufiĉas por la senco *sewing-desk*, anstataŭ *kudrilujo* (pli verŝajne li tamen celis simple *ilujo*).

oportuna, ĝi ne devos *forigi* aŭ *ŝanĝi* la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo." Al mi ŝajnas ke precize tio okazis en la *Oficiala Aldono* en 1909, rilate al *hospitalo* kaj pluraj aliaj terminoj.

Necesas pripensi: Ĉu povas esti ke la vorto *geja* jam elpuŝis, aŭ baldaŭ elpuŝos la kombinaĵon *samseksamulo*? Ĉu "gejeco" limiĝas al amado (amorado?)? Ĉu samseksamo ne inkluzivas ankaŭ neseksan amon al samseksuloj, dum gejeco estas specife seksa vorto?

La Fundamento ankaŭ pludiras: "ĉio bona, kio ne troviĝas en la 'Fundamento de Esperanto' devas esti rigarata ne kiel deviga, sed nur kiel *rekomendata*."

Tre subjektiva estas takso pri la signifo de la vortoj "ĉio bona". Miaopinie, *fare de*, kaj eble *far*, esprimoj malakceptataj de Marcel (por detaloj, vidu lian libron *Por Guste uzi Esperanton*), estas bonaj frazoj—min ne konvinkas lia rezonado kontraŭ ilia "logikeco", kaj ili al mi ŝajnas tre utilaj. Do miaopinie ili povas esti rekomendataj, kvankam ne devigaj, konforme al la Fundamento. Sed same, "ante" kaj "ate de", proponataj de Marcel, nepre devas esti permesataj, ĉar ili 100%e obeas la regulojn de la Esperantaj gramatiko kaj vortfarado. Ĉu aŭ ne oni volas rekomendi ilin dependas de persona gusto. Do SAT grave eraris anatemante Marcelon.

Sed jes, Marcelo ankaŭ pravas pri neologismoj...

Ĝis ĉi tie, mi malakceptis la specifan proponon de Marcelo (nuligi la terminon hospitalo), kaj esprimis iom da necerteco pri la termino *geja*. Sed kiam, verkinte la ĉi-suprajn alineojn, mi malfermis novan numeron de la gazeto Monda Forumo, kiu kredigas sin prestiĝa kaj serioza gazeto, kion mi trovis? El tiu unusola numero mi ĉerpis ne nur la sekvantajn specimenojn, sed multajn pli—

"Oni rekonas en li homon de supereco kaj *gvidoron* naskitan ordoni." *Gvidoro* ne estis komposteraro, ĝi uziĝis plurfoje en la artikolo. *Gvid* estas Esperanta radiko, sel el kie venis tiu *-or-*??

"La tuta Pariza *aglomerato*". Mi demandas al mi kiel tiu *aglomerato* diferencas disde la *Pariza regiono*, *Pariza distrikto*, aŭ *metropola Parizo*?

"La *esperantofona* parto de la parizanoj". Ĉu pli klera grupo ol la *Esperantistaro* en Parizo? Aŭ la *Esperantoparolanta parto de la Parizanoj?* Aŭ la *Esperantlingva* parto de la Parizanoj? Mi suspektas ke la verkinto konis la Anglan vorton "francophone" (Francparolanta) kaj kreis pseŭdovorton "Esperantophone" el kiu li faris "Esperantofona" en Esperanto. Ke *fono* havas tute alian signifon kiu kolizias kontraŭ tiu pseŭdo-Anglalingva prunt-

aĵo, ne ĝenis lin.

"Mi ne scias, ĉu la cenzuristo estis ebria aŭ pli *stupida* ol kutime." Ĉu mi estas stulta, rekomendante nian Esperantan vorton *stulta*?

"Ĉi tiu sufiĉe *paperoza* kunlaboro". Ĉu alispeca ol *paperplena*?

"Skemon de *grasradika* projekto". Ve! Eble Anglalingve, "grass roots", sed "graso" en Esperanto havas tute alian signifon!

"*Reprezentativa* sekco tra la Esperanta popolo". Kiel tio diferencas disde *reprezenta*?

"Estu al mi pardonita la ĵusa *gago* parizisma". Temas pri simpla *ŝerco*.

"Ties reduktiĝo al fakte eksklude lingvokulturaj fenomenoj estas en si mem pseŭdokultura, tieldire, minimume tre malvasta *skopo*". La senco de ĉi tio estas malklara. Eble amplekso? celo? kampo? vido?

"Kiel ejon por ĉio viva (kulturo por *biotopo*!)." Laŭ la kunteksto, ŝajne celata estas *vivejo*, aŭ *vivantejo/vivaĵejo*??

"Pejorative aŭ *mejorative*"—tiu verkinto tre klare volis paradi eruditecon. Sufiĉus *komplimente*.

"La postuloj de la *invadoroj* el la VIIIa jarcento." (*Invadintoj*.) Mi supozas ke ili havis propran *gvidoron* (vidu supre)! Verŝajne ni vidas la langon de la redakt*oro* en tiuj vortoj, ĉar temas pri du apartaj aŭt*oroj* de artikoloj. Jen analogiemo frenezigiĝinta, kaj absurda mistordado de la lingvo, kiu ne plu estas uzata por komunikado.

Mi ne komentos pri *avio* (aeroplano, aviadilo), *rezidi* (loĝi), *dole* (intence), *agive* (ageme, aktive), *noosfera preventilo* (pri tio divenu mem!), kaj aro da aliaj pseŭdoesperantaj vortoj.

Kio elstaras estas ke ekzistas nenia principo en la uzado de tiuj "neologismoj". Individuaj aŭtoroj senzorge kreas kaj uzas ilin laŭ sia kaprico. Mi devas demandi al mi: kial? Eble Marcelo pravas, eble Esperanto ja rapide malaperas.

Konkludo:

Apud apartasenceco, utileco estas grava kriterio kiam oni taksas la dezirindecon de specifa termino. Estas malfacile trovi aŭ la unuan, aŭ la duan, kriterion kiam ni ekzamenas la ĝeneralan neologismaron en aktualaj eldonaĵoj. ❑

PROPONO POR LA SEKVA ĜENERALA KUNVENO DE AEA

De Owen Loneragan. Hon. Treasurer, 27 September 1995

POR KONFIRMI KE:

1. Jarkotizoj por AEA estu laŭ la kalendara jaro (januaro-decembro);
2. La *ESK*-Fonduso por aĉeti, anstataŭigi, kaj ripari la komputil-aparataron (*ESK* 17/8) havu (a) kontantan krediton je $2232.69 (*ESK*/29) kaj gajnu proporcian interezon, ekde la 30 junio 1995;
   (b) $3 el ĉiu jarkotizo por AEA (*ESK* 17/8), ekde 1 januaro 1996;
3. Ĉiuj pli fruaj decidoj pri la speciala Fonduso por apogi *ESK*-on estis nuligitaj per decidoj dum la 31-a Kongreso de AEA (*ESK* 17/7).

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION (INC)
STATEMENT OF ACCOUNTS FROM 1 JULY 1994 TO 30 JUNE 1995
Operating account 6136 0090 363 6 Commonwealth Bank of Australia, Bentley, Western Australia.

RECEIPTS			
BALANCE AT 30 JUNE 1994			$1896.42
Less inclusion of Libroservo credit $20			$1876.42
Subscriptions:			
AEA membership (With Libroservo credit $50.84)	$5106.69		
NZEA ESK journals	1796.00	$6902.69	
Libroservo:			
To journal apparatus		598.31	
To Matasin-Banham Trust sale of books		323.35	
Members' donations		75.00	
Examinations		52.00	
Recoups:			
Treasurer's account with editor	109.06	964.00	
SAES Summer School	705.50		
Insurance journal apparatus	149.44		
Bank interest		25.55	
Add transfers from CMCA (78 3531) $5350 + $5000 from HBS (32 7354) +		$8940.90	$19290.90

PAYMENTS				
Journals:*				
ESK 2180 copies in six issues		$5272.76	$6039.36	
Printing ESK	$3394.00			
Editor's expenses*	452.84			
Postage	1425.92			
OmniPage Pro computer program	500.00			
Insurance of ESK apparatus	266.60		766.60	
Atari computer for support services		469.91		
Insurance for the Atari		12.12	482.03	
Your Esperanto Bulletin			39.73	
Correspondence:				
Secretary			219.39	
Treasurer			228.48	
Examinations			33.46	
Affilitation with UEA			228.00	
Subscriptions to journals			192.12	
Auditor for balance sheets			80.00	
La 31-a AEA Kongreso at Southport,Qld			18.40	
Bank fees and taxes			28.20	
Muzzy video project			1006.25	
Donations:				
Adelaide SAES LKK for UK 1997			5003.23	
Melbourne Ekparoli project			$5009.60	
TOTAL PAYMENTS				$18608.25
BALANCE AT 30 JUNE 1995				**$2559.07**

*add $345.57 for Editor's expenses with *ESK* account, tyotal $798.41

Cash Management Call Account 6136 0078 3531 CBA, Bentley, W.A.			
BALANCE AT 30 JUNE 1994	$6302.26		
Less transfers to above a/c, $5350 and $0.04 tax	5350.04	$952.22	
plus interest		112.51	
BALANCE AT 30 JUNE 1995			$1064.73

AEA STATEMENT OF ASSETS AS MEMBERS' EQUITY IN INVESTMENTS AT 30 JUNE 1995		
Operating a/c CBA 6136 0090 3636	$2559.07	
Cash Management Call a/c CBA 6136 0078 3531	1064.73	
Home Building Society TD 037-0327354 (matures 14/08/95)	1211.33	@ 6.5%
Transferred R&I-BW 6805769 closed to HBS 037-0327724 (matures 09/01/96)	25725.18	@ 8.75%
ASSETS AS MEMBERS' EQUITY IN INVESTMENTS AT 30 JUNE 1995	$30560.31	

AEA STATEMENT OF ESTIMATES FOR MEMBERS' EQUITY IN BUDGET AND CONTINGENCIES IN OPERATING A/C'S

JOURNAL ESK APPARATUS SINKING FUND AT 30 JUNE 1995			ASSETS*
Income from Libroservo (1992-95)	$2146.89		
from NZEA	1049.00		
from AEA (3 x NZEA)	3147.00		
	Total	6342.69	
Expenses			
Upgrade computer	$1744.00		
Scanner	1758.00		
Repairs	758.00		
Software	500.00	4760.00	$1582.69
Add value for Macintosh Classic II computer (and pro-rata interest)			$650.00
		Total:	$2232.69

* Editor's equipment assets (add existing value of apparatus for ESK magazine, $2046)

BRING FORWARD ABOVE OPERATING ACCOUNTS:			
	CBA 90 3636	$2559.07	
	CBA 783531	$1064.73	
	HBS 0327354 TD	$1211.33	$4835.13

STATUTO-ŜANĜO

Regulo 6. Administra Jaro. La Administra Jaro estas la Financa Jaro.

Membroj de A.E.A. voĉdonis jene al la proponita ŝanĝo (*ESK* Sept. 1995):

Por — 88 Kontraŭ — neniom

Bonvolu korekti, kie necese, Regulon 6 en via ekzemplero de la Statuto.

Journals ESK/Adresaro/Affiliation UEA/& journals (one year)	$8 000.00
AEA Summer School Adelaide ($871.50 at 6/94 + recoup $705.50) $1577 (x2)	$3154.00
Goldsmith Recruitment Foundation $6971 at 6/94 less re-allocations in trust a/cs $3800+ contingency $1829	$5000.00
Matasin-Banham Publications Foundation $8838.33 at 6/94 less re-allocations in trust a/cs $3926 + Libroservo $323.35 + contingency $764.32	$6000.00
Miscellaneous (include printer for the above Macintosh computer)	$988.49
TOTAL ASSETS IN BUDGET AND CONTINGENCIES	$30560.31

The Libroservo holds 34 *Aŭstralia Antologio* @ cost $680, 51 *Sed Nur Fragmento* @ $850. The Libroservo also holds 39 *Presenting Esperanto* available for displays on behalf of AEA.

Owen Loneragan
Hon Treasurer
11 September 1995

I have audited the above statements for year ending 30th June 1995 and found them to be in order. In my opinion the statements of Income and Expenditure fairly report the financial transactions of the year and Cash Balances of $30,560.31 are supported by official statements. Fixed Assets and Contingencies have not been included in the audit check.John Box M.I.A.A.

DIALOGOJ DE LA DIOJ

La "Dialogoj de la Dioj", kiu aperis ĝis nun felietone en *ESK*, pro spacomanko ne plu aperos en ĉi tiu gazeto. Ĝi estos havebla komence de decembro en libroformo. *Abonantoj kaj membroj* povos ricevi po unu ekzempleron senpage, se ili sendos tiucele taŭgan koverton, adresitan kaj afrankitan, al la redaktoro de *ESK*. Ni rekomendas uzi la kartonajn "Postpak Tough Bags" vendatajn de Aŭstralia Poŝto (dimensio B4), por ke la bindo de la libro ne difektiĝu. Neabonantoj/nemembroj povos aĉeti la libron ĉe la redaktoro de *ESK*; la prezo indikiĝos en nia januara numero.

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Kotizoj: Aŭstralia Esperanto-Asocio: AŬ$30 por individuo aŭ klubo (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: $10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: $NZ $40 por individuo, $50 por geedza paro, $10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: $1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, P.O. Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, A„$3.00 + poŝtsendkosto; por nemembroj, $4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la kasisto de AEA.

Abonoj ekster Aŭstalazio: En Usono kaj Kanado: US$30.00, mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned.Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©1995 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©1995 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke oni nomu la fonton.

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 59B Lukin St, Beverley WA 6304. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.